

## AVENO #40 - Homaj Rajtoj, Paco

Januaro - Decembro 2014

Ghenerala rimarko: pluraj informoj alvenas kun peticio - kompreneble plej multaj el ili ne plu estas aktivaj. Do, bonvolu kontroli la daton, se vi intencas subskribi ian ajn peticion.

### Ligoj:

AVE: <http://www.verduloj.org> , novaj artikoloj je la enirpago, aliaj sub "Dokumentoj

Lingvaj Rajtoj = Homaj Rajtoj: <http://www.lingvaj-rajtoj.org/>

Tutmondaj Mondcivitanaj Teritorioj: <http://www.recim.org/dem/tcm-list.htm>

===

### 2014-12-09 Defendi la Homajn Rajtojn chie ajn:

2015 la germana J. Ruecker ighos estro de la Homrajta Konsilio de UN (angle: UNHCR).

En Vikipedio ankoraŭ mankas la informo pri UNHCR en Esperanto.

Certe ankaŭ vi legas tro ofte pri kruelajhoj faritaj flanke de reprezentantoj de ŝtatoj. Ne eblas nomumi chiujn, do, jen kelkaj ekzemploj - espereble „oni“ sukcesos plibonigi tiajn situaciojn.

- Norda Koreio - pro kritiko kontraŭ la politiko sekvas kruela gulago - En Japanio oni eldonis pri tio la libron „Chu ili diris la veron?“ - ankaŭ en Esperanto. Espereble la nova diktatoro estas pli malferma ??

- HongKongo - la china registaro invitas al elekto de guberniestro, sed la elektotaj estos elektitaj de la Komunisma Partio de Pekino. Kritiko eblis, sed limigite, kaj la registaro ne diskutas kun la studentoj.

- Tajlando - kritiko kontraŭ la militara reghimo (kutime per 3-fingroj) malakceptata. Kontraŭ verdikto de militara jughejo ne eblas apelacio.

- Usono - Guantanamo - malgraŭ tio, ke la prezidento Obama haltigis la torturadon, li nek sukcesis doni al la malliberigitaj jughproceson, nek liberon. Ankoraŭ pli ol 100 atendas la re-liberigon. Jose Mujica, prezidento de Urugvajo, ĵus akceptas 6 de tiuj. Usono volis ke ili tie estos denove malliberigataj dum pliaj 2 jaroj. Sed Urugvajo estas memstara lando.

- Usono - ankoraŭ rasisma justico kaj polico - la registaro ne havas influon al la rasismaj asizaj tribunaloj. Civitanaj protestoj sekvis.

- Usono ankoraŭ ne partoprenas en la Internacia Jughkortumo kaj ne en UNHCR

- Europo - defendas sin kontraŭ rifughintoj - ĉefe el Afriko. Kaj tiuj kiuj sukcesis alveni.

Necesas enmigra politiko kaj disdivido de la alvenintaj en tutan EU-on. Paralele necesas subteni memstaran evoluon de la afrikaj landoj; ekz-e malpermesi subvenciitajn eksportojn da nutrajhoj el EU al Afriko; ĉar tie ili detruas la vivbazon de la lokaj kamparanoj. Simile pri malnovaj vestajhoj.

- Rusio kaj la aliaj „direktitaj (prezidentaj) demokratioj“ - malebligas kritikon.

- Israelo (grava parto de la partioj) celas ighi etna ŝtato, kaj reduktas la viv-spacon de la najbaraj palestenanoj, pere de la mur-sistemo, malegala akvo-rajto ktp kaj konstruado da grandaj loghkvartaloj; tiel jam daŭre lezas la HR de la palestenanoj.

- Meksikio, kaj similaj landoj - reghimoj, kie koruptaj strukturoj estas defendataj de kontraŭ la civitanoj. Antaŭnelonge (laudire) urbestro disdonis 43 protestantajn indighenajn studentojn al mafio, kaj tiuj mortigis ilin.

- Korupto ekzistas eĉ en t.n. demokratiaj landoj, sed tie oni povas malkovri kaj malshalti ghin.

- Religiaj sistemoj ofte ne toleras liberan pensadon, kaj agas kruele kontraŭ „pekantoj“ - ekz-e Irano, kaj pluraj aliaj islamaj landoj.

(laŭ Andreas Zumach, Bad. Ztg. 2014-12-09, p.2; kaj aliaj informoj)

*Komento mw: se vi trovas ke mi erare raportis - bonvolu korekti per citajho.*

===

2014-10-08 Europa Civitana Iniciativo por aboli la traktadon de TTIP kaj CETA

Malgraŭ tio, ke la EU-Komisiono ne akceptis ECI-on kontraŭ TTIP, la 250 organizajhoj decidis kolekti laŭ la reguloj de ECI 1 milionon da subskriboj.

Jen la retejo en 23 lingvoj. Fakte mia ret-legilo (SeaMonkey V.2.6.1) ne montris la subskribo-formularon. Sed je alia komputilo ghi funkcias. Do, mi subskribis je unu el tiuj organizajhoj.

<http://stop-ttip.org/de/unterschreiben/>

---

2014-10 Amnestio Internacia petas por politikaj malliberuloj en Rusio

Jen informo pri manifestaciintoj kontraŭ la nova prezidenteco de V. Putin en 2012-05-06, de kiuj estis akuzitaj 30 pro perforto kontraŭ policistoj kaj partopreno je amasaj maltrankvilajhoj:

(de) <http://www.amnesty.de/bolotnaja>

---

2014-10-04 Tibetanoj solidaraj kun la demokratio-postulantoj en HongKong  
Bedaurinde la china registaro ne volas respekti la promesitan relativan autonomion; nenur studentoj manifestacias. Intertempe ili estas atakataj - laŭ informoj - de pagitaj Triadomafianoj.

[http://tibetnetwork.org/tibet\\_hongkong\\_solidarity/](http://tibetnetwork.org/tibet_hongkong_solidarity/)

Bedaurinde denove mem-bruligis sin tibeta studento, postulante Kulturajn Autonomion.

===

#### 2014-09-26 **Minoritatoj en multaj landoj subpremataj**

- Roma en Europo, mankas evoluo-projekto kiu taugas por ili.
- Krim-tataroj (14% en Krimeo) - ĉar ili kontraŭis la aligon al Rusio kaj bojkotis la aligho-referendumon. KGB/FSB-uloj perforte traserĉis la oficejon de ilia Medjhlis (konsilio).
- Ujguroj en nord-okcidenta Ĉinio iam la majoritato, nun ekonomie marghenitaj en sia regiono; Ilham Tohti modera ujguro, kiu klopodis plibonigi la situacion pere de kritikoj, estis punita al viv-longa malliberejo. La juĝejo ne permesis al li atestantojn en la 2-taga proceso.
- Tibetanoj klopodis montri sian deziron al kultura autonomio, pere de sin-bruligoj. Sed Ĉinio timas - kaj pro tio brutale reagas.

(Tataroj: laŭ Bad.Ztg. 2014-09-20, p.5)

(Ujguroj: laŭ Bad. Ztg. 2014-09-24, p.6)

(Roma kaj tibetanoj - laŭ diversaj informoj)

---

#### 2014-09-26 **Ĉu Rusio reiras al Stalinismo ?**

Feliks Dzerzhinski re-vivas - en nomo de elita trupo de la Interna Ministerio.

Tiu estis la kreinto de la kruelega sekreta servo sub Stalin - ĉu tio estos la vojo de Rusio ?

- en Rusio: Oleg Sentsov, ukraina filmisto el Krimeo, estas kaptita hejme, ĵetita en Lefortovo-malliberejon, kaj akuzita plani terorismajn agadojn, Oni supozas ke okazos „fenestra proceso“.

- **ukraina pilotino** de helikoptero estas akuzita pro mortigo de iu (??). Por ĉeesti la proceson alveturis **Rebecca Harms, MdEP** de la Verdaj Partioj, ŝi estis devigata atendi plurajn horojn en la Moskva flughaveno, kaj poste oni malpermesis al ŝi - kiel ne-dezirata persono - envojaghi, malgraŭ tio ke ŝi havas diplomato-pasporton kaj la rusa ambasadejo en Berlino ne informis ŝin antaŭe pri tio. Homrajto-defendantoj timas ke ankau tiu proceso estos ne juste okazigata.

(Oleg Sentsov: laŭ taz 2014-09-18, p.17)

(ukraina pilotino & Rebecca Harms: laŭ radio-elsendo , ARD 2014-09-26)

(Feliks Dzerzhinski - mi rememoras la FD-statuon en Moksvo antaŭ la infano-magazeno 1989, laŭ Bad.Ztg. 2014-09-26, p.6)

===

#### 2014-09-13 **Tradukista konferenco deklaras al paca respekto**

Malgraŭ la aktuala haltigo de pafado, restas la konflikto inter Ukrainio kaj Rusio.

Tradukado signifas Kulturajn Diplomatojn

Multaj tradukistoj subskribis la alvokon, admonante:

- Rusion rezigni la malampropagandon kontraŭ Ukrainio
- Ne indas al la Rusio, lando de alta kultura tradicio, ĉerpi superecon pere de agresemo
- Ne disŝiri la historion kulturajn ligojn pere de perforto
- Komprenante ke la nuna rusa politiko de mensoga propagando ghenas la propran evoluon kaj

ili sentas sin devigataj kontraŭi mensoga-propagandon, sed peri inter la kulturoj tradukante libere kaj honeste.

Jen la kompleta teksto en la rusa kaj germana, kun la subskriboj:

<http://znn.info/petition.html#list>

(dankon al A. Kuenzli por la retligo)

Komento AVE/mw: Mi ŝatus esperi, ke finfine okazus reiro al paca kunekzistado, respekto de la limoj, kaj pli adekvata respekto de la ruslingva kulturo ene de Ukrainio - sed tiu problemo neniel rajtigis la agreson flanke de la granda najbaro. Mortis tro multaj ambaŭflanke - pro nenio kaj la granda Rusio eĉ ne honoris siajn mortintajn soldatojn - kashante la kazon de ilia morto - kakaja bednaja strana/ kia povra lando.

Tiu deklaro rememoras min al la kanzono de **Vladimir Vysocki „Ja ne ljublju“** - „mi ne ŝatas“ - kie li kontraŭas kontraŭ registaraj ŝpionoj kaj kalumnioj.

Ekzistas bela traduko en Esperanton de N. Lozgagev. Bedaurinde ambaŭ mortis tro frue.

===

2014-09-01 Nigra Jubileo: **75 Jaroj post la komenco de la Dua Mondmilito - denove**

2014-09-03 Putin kaj Poroshenko telefone parolis pri solvoj - detaloj mankas.

Nun nek temas pri milito kontraŭ Rusio, nek pri konkero de Rusio.

La Duan Mondmiliton komencis la nazia Germanio celante havigi al si pli da tereno, kun la kroma celo sklavigi la slavajn popolojn.

Jam antaŭ la komenco de la milito 1939-09-01 okazis akaperado de terenoj, Sudeta regiono en Ĉeĥio, kaj tuta Slovakio; Hitler ĉiam sukcesis trankviligi la eksterlandon (Britio kaj Francio) pere de vortoj. Propagando kredigis la germanan popolon ke oni devas sin defendi.

Same kiel nun faras la rusa prezidento Putin.

Hitler kun Stalin faris Pakton, kun la celo dividi Pollandon inter Sovetunio kaj Germanio; tiu Pakto daŭris maksimume ĝis la milito kontraŭ Sovetunio (en "litova" Brest\*)

Antaŭ ne longe estis detala raporto pri tio en Deutschlandfunk.de :

La militon komencis Hitler per tute mesoga afero frumetene - ke la germana elsendo-stacio en Gleiwitz (Gliwice) estas atakita de poloj. Fakte temis pri germanoj kiuj trompe pretendis ke okazas atako.

Tuj poste germanaj miltiaviadiloj per bomboj detruis la polan urbeton Wielun (20 km de la tiama limo).

Kaj ankau samtempe el germana lernejo-ŝipo antaŭ la Libera Urbo Danzig (Gdansko) rampis soldatoj kiuj atakis Westerplatte - kie troviĝis municia stoko. La sekva celo estis la poshtoficejo de Danzig. La oficistoj defendis la domon, ĝis ili ne plu havis municion. Ili elvenis svingante blankajn tukon - tio ne helpis: ĉiuj estis rapide kondamnitaj al morto - pro partizana agado.

Oni povas lerni el tiaj milito-komencoj; kaj esti singarde. Bush (Irako) kaj Putin ankau lernis (sed por alia celo).

Putin jam montris (parolante pri Nova Rusio) la limon sur historia Nova Rusio - fakte temas pri la suda-orienta duono de Ukrainio - evidente tio estas lia celo. Ĝis Moldavio; kie en apuda landeto Ĉednistrio (Transdnistrio) postrestis multaj rusoj; kiuj orientiĝas al Rusio - kaj estas subtenata de Rusio.

Ni - eŭropanoj - ne volas ataki Rusion, sed ni volas ke Rusio respektas la nunan limon de Ukrainio - laŭ la Popolaro-Legho.

La rusa asocio Soldato-Patrinaj intertempe ankau ricevis la statuson de "eksterlanda agentejo" - kaj ili ne ricevas respondojn al demandoj kie troviĝas siaj infanoj, kaj se iu revenas en ĉerko - mankas la ĝusta informo kie li mortis (en Ukrainio).

(laŭ Deutschlandfunk.de, kaj vikipedio.de)

\*) Nazia Germanio okupis la fortreson de Brest (1939-09-17), kaj transdonis ĝin al Sovetunio, laŭ la Pakto. Sed 1942-06-22 germana armeo tie komencis la militon kontraŭ Rusio, la sovetuniaj soldatoj povis teni la fortreson ĝis la 26-a de Junio.

===

2014-08-29 Rusio invadas Ukrainion per „feriantaj“ soldatoj

La akcepto de Krimeo pere de metodo kiu ne agordas kun la internacia legho estis speciala afero, kiu signifas reprenon de donaco (donacita de sovetunia prezidento Ĥrusĉov) - kaj ne estis akceptita de la granda plimulto de aliaj nacioj.

Nuntempe kelkaj miloj da rusaj soldatoj troviĝas en la oriento de Ukrainio; plej laste alvenis 1000 kune kun modernaj kaj ankau pezaj armiloj en la sudon.

(laŭ pluraj informoj, i.a. satelita bildo, i.a. Bad. Ztg, 2014-08-29, p.1-2)

Komento de AVE/mw:

Ĉu „ruza“ estis elektita de Zamenhof kiel homonimo kun „rusa“ ?

Laŭ la aktualaj evoluoj en la akaperado de ukraina teritorio flanke de la rusa urso, eble jes.

Eble la ukrainaj politikistoj faris kelkajn erarojn, sed tio ne donas la rajton al la granda najbaro akaperi tion kion eblas preni facile.

Mi suspektas jenan planon de Putin - pasi la tempon per pacigaj paroloj, kaj paralele preni pere de simila metodo kiel la Krimeo la plej-orientan parton de Ukrainio, kaj prefere krome la sudan regionon laŭlonge de la Azova Maro por havi rektan aliron al la Krimeo. Ĉar konstrui ponton el

Rusio al Krimeo estus multe pli kosta kaj daurus pli longe ol fari tian akaperadon. Poste povus alveni la regiono ghis Odessa kaj Tiraspol ??  
Mi esperas ke tio ne okazos. Sed nek EU nek Usono volus fari militon kun Rusio.

===

2014-08-25 Rusio akuzis Ekodefense

Ekodefense protestis kune kun la civitanoj kontraŭ la planita nova atomcentralo Baltic AES (2 novtipaj VVER 1200 reaktoroj) apud Kaliningrado; kaj sukcesis, ĉar oni neglektis fari la bezonatajn sekureco-studojn.

Ekodefense, kies ĉefa persono estas Vladimir Slivjak, kunlaboris kun la germanaj anti-atom-aktivistoj, por haltigi la eksporton de malriĉigita uranio de Gronau al Rusio, kie jam 27 000 tunoj estas stokataj en bareloj sub-ĉiele; la rubo estas ankoraŭ radioaktiva, kaj uranio estas toksa metalo.

Pro la nova leĝo la justicoministerio informis Ekodefense, ke ili nun apartenas al la „eksterlandaj agentoj“, (supozeble ĉar ili ricevis subtenon de eksterlandaj NROoj).

Ekodefense oficiale protestis, sed ne ricevis respondon. Sed nun ili estas akuzataj, pro la „ne-listigo kiel eksterlanda agento“.

(ru) <http://ecodefense.ru/>

(detalaj anglaj informoj) [http://www.nuclear-](http://www.nuclear-heritage.net/index.php/Nuclear_plant_near_Kaliningrad_%E2%80%93_bad_story_that_must_be_ended_immediately)

[heritage.net/index.php/Nuclear\\_plant\\_near\\_Kaliningrad\\_%E2%80%93\\_bad\\_story\\_that\\_must\\_be\\_ended\\_immediately](http://www.nuclear-heritage.net/index.php/Nuclear_plant_near_Kaliningrad_%E2%80%93_bad_story_that_must_be_ended_immediately)

(laŭ B. Clasen, taz, 2014-08-25, p.8)

=====

2014-07-10 UEA en la 7a sesio de Ekspertaj Mekanismoj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj (EMRIP)

Palaco de Nacioj, UN, Ĝenevo, la 10-an de julio 2014

Parolado de Stefano Keller, UEA pri la tagorda punkto 7: Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la rajtoj de indiĝenaj popoloj. Kaj ankaŭ pri TP 3:

Informilo (Julio 2014) de la UN-oficejo de Universala Esperanto-Asocio

**UEA atentigis ĉe UN pri lingvaj rajtoj de indiĝenaj popoloj**

De la 7-a ĝis la 11-a de julio okazis en Ĝenevo la 7-a sesio de la Ekspertaj Mekanismoj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj (EMRIP). Stefano Keller, estrarano kaj la ĉefrepresentanto de UEA ĉe UN en Ĝenevo, aktivis en la kvintaga evento. Ĝiaj temoj estis alireblo al justico, subteno kaj protektado de la rajtoj de indiĝenaj popoloj, prevento de kaj pretiĝo kontraŭ naturkatastrofoj kaj la evolu-agendo post 2015. Aparte signife estis traktataj la Monda Konferenco pri Indiĝenaj Popoloj kaj la Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj.

Krom fakuloj, parolis reprezentantoj de indiĝenaj popoloj, NRO-j kaj ŝtatoj. Ĉeestis kaj intervenis ankaŭ la Speciala Raportanto de UN pri Indiĝenaj Aferoj, la prezidanto de la Homrajta Konsilio kaj la Vickomisiito de UN pri Homaj Rajtoj. La estrarano de UEA intencis paroli, kun 5-minuta tempodispono, pri la temo Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj koncerne lingvajn rajtojn.

Por trakti la rezoluciprojekton de la Monda Konferenco, necesis tamen atendi ĝian aperon kaj la tradukojn fare de volontuloj de Centro de Dokumentado, Esploro kaj Informado de Indiĝenaj Popoloj (DOCIP), svisa NRO. Pro tio kaj pro videokonektiĝoj kun UN en Novjorko, por kune diskuti la temojn, kaj pro la longeco de la listo de alparolontoj necesis modifi la programon kaj mallongigi la alparoltempon al 2 minutoj. Sekve, Keller devis reredakti sian tekston.

Unue Keller tamen intervenis neantaŭvidite la 9-an de julio post la ricevo de la rezoluciprojekto de la Monda Konferenco. Evidentiĝis, ke ĝiaj koncernaj punktoj (pri komunikado, edukado, justico) ne menciis la uzeblon de gepatra lingvo tie, kie tio estas antaŭkondiĉo de plenrajta kaj adekvata partopreno en la socia vivo. Keller alvokis por inkludigi la necesajn frazojn.

La alia interveno de la estrarano de UEA okazis la 10-an de julio dum la traktado pri lingvaj rajtoj en rilato kun la Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj, kies 13-a artikolo klare difinas ilin, same kiel la rilatajn devojn de la ŝtatoj. Keller atentigis pri la signifa malkresko de la biokultura diverseco kaj pri la neceso konservi ĝin por la daŭripova pluekzisto. Por tio la protektado de ĉiu lingvo estas grava, speciale tiu de la lingvoj de indiĝenaj popoloj, ĉar ili entenas la sciojn necesajn por konservi la diversecon.

Laŭ la celoj de la Esperanto-movado, Keller atentigis ankaŭ pri la neceso agi kun respekto al la

homa digno de ĉiu popolo, tiel ke neniu el la pli potencaj trudu siajn lingvojn kaj kulturojn al la aliaj. Li akcentis la fundamentan rolon de la gepatra lingvo en la vivo de ĉiu kaj ripetis sian alvokon inkludigi tion en la rezoluciprojekto de la Monda Konferenco, akcentante, ke la vortoj "lingvo" kaj "gepatra lingvo" mankas en pluraj UN-dokumentoj.

Keller partoprenis en paralelaj eventoj, revidis delegitojn konatajn el antaŭaj sesioj de EMRIP, i.a. unu el la projekto Indiĝenaj Dialogoj, kaj ekhavis novajn kontaktojn. Li donacis la libron Lingva Genocido en Edukado aŭ Tutmonda Diverseco kaj Homaj Rajtoj de Tove Skutnabb-Kangas al Kenneth Deer, unu el la plej gravaj indiĝenaj aktivuloj. Reprezentantoj de NRO-j venis al Keller post liaj alparoloj por esprimi intencon kunlabori. Unu diris, ke komence ŝi ne povis imagi, kion faros UEA en la kunsido, sed post lia alparolo ŝi komprenis, ke esperantistoj subtenas kaj defendas ĉies lingvaj rajtojn.

Keller sidis apud la reprezentantino de Ĉinio. Kiam li proponis al ŝi la ĉinlingvan afiŝon pri la Esperanto-Tago (26 julio), ŝi diris, ke ŝi jam konas ĝin, ĉar ŝia patrino havas ĝin sur la muro! Reprezentantojn de Urugvajo li informis pri la baldaŭa ILEI-konferenco en Montevideo.

La du alparoltekstoj de Keller (en pluraj lingvoj), video kaj sonregistraĵoj el la evento troviĝas ĉe: <http://www.linguistic-rights.org/eventoj/>

Jen la koncerna retejo: <http://www.esperanto-un.org/informiloj>

Deklaracio de UN pri la Rajtoj de indiĝenaj Popoloj: [http://www.verduloj.org/ind\\_pop\\_rajt.htm](http://www.verduloj.org/ind_pop_rajt.htm)  
===

2014-07-18 Plia ekzemplo de fia propagando el Rusio

ukraino-devena virino el najbara urbeto de mi (mw) estis atakita: en la rusa fejbuko odnoklassiki.ru, kie ŝi restis por havi kontakton kun siaj geamikoj, „oni“ asertis ke ŝi marchandis organojn de pro ukrainaj bataloj mortitaj homoj. Kion ŝi tute ne faris. Oni uzis fotojn de ŝi por shajnnigi ke tio povus esti reala; krom tio oni sendis plurfoje en la rusan semajn-raporta televidajho falsigitan intervjuon kun ŝi kie ŝi ordonis diversajn organojn por tuja liverado.

[https://www.google.com/url?q=http://www.badische-zeitung.de/suedwest-1/und-schon-bist-du-eine-kaltbluetige-organhaendlerin--87630643.html&sa=U&ei=ZUrKU\\_mFD62O4gT504Bo&ved=0CAYQFjAA&client=internal-uds-cse&usq=AFQjCNFDL55AaXS62bofawKxjOLvYy0\\_uw](https://www.google.com/url?q=http://www.badische-zeitung.de/suedwest-1/und-schon-bist-du-eine-kaltbluetige-organhaendlerin--87630643.html&sa=U&ei=ZUrKU_mFD62O4gT504Bo&ved=0CAYQFjAA&client=internal-uds-cse&usq=AFQjCNFDL55AaXS62bofawKxjOLvYy0_uw)

Komento de AVE/mw: Ekzistas proverbo: „En milito la vero mortas kiel unua“

Ni rememoras al la nazia Germanio kiu per simila mensogo komencis la 2-an Mondomiliton.

---

2014-07-18 Kiu sendis la memcelantan **bombon al la civila aviadilo** super Ukrainio ?

Mortis 292 civiluloj el diversaj nacioj, ĉar ili sidis en aviadilo, en alteco de 10 km, kiun (evidente) bombis BUK-rakedo. Laudire la separatistoj volis trafi militan aviadilon kiu flugis proksime de la civila.

Ke la separatistoj posedis tian kompleksan sistemon jam jhetas lumon al la Kremlo; ja ankaŭ decidaj gvidantoj de la separatistoj venas el Rusio, ekz-e Alexander Borodai kiu jam ludis rolon ĉe la akapero de Krimeo, kaj ankaŭ Igor Girkin.

La ukraina registaro certe faris pluraj erarojn, sed tio ne donas rajton al Rusio mal-stabiligi la najbaran landon.

Intervjuo kun historiisto pri orienta Europo celas al la rolo kaj respondeco de V.Putin, kiu devas respekti la suverenecon de Ukrainio.

[http://www.deutschlandfunk.de/flugzeugabsturz-in-der-ukraine-ein-wendepunkt-in-dem.694.de.html?dram:article\\_id=292213](http://www.deutschlandfunk.de/flugzeugabsturz-in-der-ukraine-ein-wendepunkt-in-dem.694.de.html?dram:article_id=292213)

---

2014-07-19 **Israelo** militas kontraŭ Gaza - temas ankaŭ pri homoj - Peticio bremsi Israelon.

Israelo evidente sekvas politikon de marghenigo de la palestena teritorioj, kaj ne ghenas mortigi senkulpajn infanojn.

Kiu komencis ? tiu demando reirus al la forpelado de la judoj flanke de romianoj ...

Bedaurinde ankaŭ kaj ankoraŭ ekstremistoj de la palestena flanko jhetas rakedojn, kaj ne emas sendi pacajn kolombojn. Pro tio Israelo facile havas argumenton bombadi - unuarange por detruji la tunelojn (tra kiuj venas la materialo) - sed neeviteble detruas domojn kaj la bazon de ebla paco. La palestenaj ekstremistoj siaflanke uzas civilajn personojn kiel ŝildo, kaj ekpafas rakedojn el proksimeco de loĝdomoj kaj hospitaloj - ne pli bone ol la alia flanko.

La chefa afero estus trovi interkonsenton pri du-shtata solvo laŭ la kontrakto de Oslo (1967) - se mi bone rememoras.

Reprezentanto de KKL ( Keren Kajemet Leisrael, israela nacia fonduso) diris iam al mi, ĉar mi rifuzis pli donaci por la rearbarigo de Negev - la araboj povas elmigri en la grandajn arabajn terenojn, sed ni judoj ne havas alian ol tiu Israel. Tio shajnas la baza celo de Israelo - forpeladi la arabojn. Eble lasi kelkajn por labori.

Kaj la daŭra konstruado de novaj loĝ-kvartaloj en la Okcidenta Bordo, kaj la malhelpo de la tie vivantaj araboj je normala memstara vivo (detruo de domoj, instalajhoj, olivujoj, troa prenado da akvo) estas ne-justa agado - kaj ne gvidos al paca kunvivado.

Pro tio AVAAZ lanchis peticion al grandaj konzernoj ne plu investi monon por tia sistemo, kiu similas al tiu de Apartheid en Suda Afriko (en pluraj lingvoj):

[https://secure.avaaz.org/de/israel\\_palestine\\_this\\_is\\_how\\_it\\_ends\\_loc/?bGgALab&v=42665](https://secure.avaaz.org/de/israel_palestine_this_is_how_it_ends_loc/?bGgALab&v=42665)

===

2014-07 Peticio kontraŭ uranio-municio

La germana filialo de internacia CSO kontraŭ uranio-municio lanchis peticion al la germana parlamento, kiu ankaŭ celas malpermesi tian municion internaci-skale:

La uzado de malriĉigita uranio kiel municio poluas eterne grandajn areojn - pro la pulvorigo de la urania kerno dum la alfrapo - per radioaktiveco kaj krome tokseco de uranio:

(de) <http://www.openpetition.de/petition/online/uranmunition-aechten>

(en) <http://www.bandepleteduranium.org/>

---

2014-07-15 Kalifornio pripensas pri la Mortpuno

Konservativa jughisto, Cormac Carney, en Kalifornio diris ke la mortpuna statuto de Kalifornio estas kontraŭ la konstitucio, ke ĝi lezas la 8-an amendon ke „kruela kaj ne-kutima punado“ estas malpermesita.

La Nacia Koalicio kontraŭ la Mortpuno sekvas tiun bonan movon:

<http://www.ncdap.org>

===

2014-06 Palestino unighas - Israelo ne emas paroli kun ili.

Fatah kaj Hamas interkonsentis kaj elektis Palestinan Prezidenton.

Ĉu tio ne donas shancon trovi pacon ankaŭ kun Hamas ?

La Papo Francisko preĝis por paca kunekzisto inter Israelo kaj Palestino.

2014-05-29 Bedaurinde Israelo detruas ejojn kaj kultivejojn de ne-shatataj CSO-oj

Antaŭ unu semajno la israela armeo detruis la partojn, inkluzive de vinber-arbustoj kaj fruktarboj de la pacema renkontejo de la kristana familio Nasser proksime de Bethlehemo.

Jen pri la Tendo de la Nacioj: <http://www.tentofnations.org/>

---

2014-05-21 **Komento de Mikaelo** pri mia akra komento en AVENO (samtaga) **pri la nuna rusa influo al Ukrainio:**

„Finfine pri Ukrainio: mi esperas ke la prezidenta elekto alportos stabilighon. La banditoj (t.n. separatistoj), (plej)parte senditaj el Rusio, ja ne rajtas akaperi pliajn partojn de Ukrainio. Bone ke ankaŭ la oligarĥoj rimarkis tion finfine.“

Kara Manfred,

Spite mia respekto por vi, mi ne povas rigardi kiel seriozajn implicojn ke la Ukrajna situacio povus iel ajn reduktiĝi al konflikto inter "rusaj banditoj" kaj ukrainaj demokratoj. Preskaŭ kvardek procentoj de la ukrajna loĝantaro havas la rusan kiel denaskan lingvon (laŭ Vikipedio). Kaj estas fakto ke iliaj rajtoj ne ĉiam estis plene respektitaj. Kompreneble, tio estas nur unu el la multaj aspektoj de la nuna drama situacio. Ĝuste pro tio, kiam oni volas resumi la situacion oni preferinde uzu plej eble neŭtralajn terminojn kaj trankvilan tonon. Se jam eksterlandanoj uzas akrajn vortojn por pridiskuti Ukrainon, kiel esperi ke la Ukrainanoj mem kapablas interpaciĝi? Amike, Mikaleo

kaj 2014-05-19 Mikaelo komentis

Nun ni turnu nian atenton al pli tikla punkto, mi parolas pri la nuna situacio en Ukrainio. Tre ĝenerale oni ne povas alveni al la paco sen volo konsideri la interesojn de ĉiu koncerna lando kaj gento. Rusio ne povas reduktiĝi al unu nura homo, la despoto Putino, la estraro en Kievo ne konsistas ekskluzive el puraj demokratoj, kaj elstaraj usonanaj fakuloj avertas jam de longe ke la politiko de Usono koncerne Rusio venigos al perturboj kaj konfliktoj. Kompreneble oni povas alkroĉi sin al la internacia leĝo, sed por ke la leĝo estu traktata serioze de Putino ĝi devu ankaŭ esti simile traktata de Usono. Sed pensu ke ĝi neniam estas kiam ĝi

ĝenas usonaj interesoj, kaj multaj deputitoj kaj senatanoj en Usono ja indignas kiam oni sugestas ke Usono baziĝas sur leĝo pli ol sur forto.

La paco inter Eŭropo kaj Rusio estas vasta, grava kaj iom komplika afero. Mi ŝatus ke ni organizu malferman debaton pri ĝi al iniciato de AVE.

**Eble somere 2015, kaj pro sen-rilataj kialoj ke tia debato okazu en Greziljono** (ili bezonas klientojn kaj aliflanke tie ni povas plej konvene organizi nian programon).

---

2014-05-13 Komento de Zlatko pri la situacio de Ukrainio

Oni kutime forgesas ke la politika situacio en malpli grandaj ŝtatoj neniel povas esti sendependa. Ĉiam en la aktivado de etaj landoj kunpartoprenas la grandaj potencoj, depende de iliaj interesoj kaj eventuala danĝero kiun iu "etulo" povus kaŭzi por grandulo.

La nuna situacio en Ukrainio tre similas al la komencoj de Jugoslavia krizo. Ene de Jugoslavio la vera potenco estis federacia armeo kiu estis regata de serba elito. Sekve la referendumo kiun faris serboj en kroata Krajina estis provokita kaj kaŭzita de Serbio kaj la armeo, kvankam formale ili ne partoprenis, kaj la tieaj serboj mem faris tion. Ghi estis tute same efektivigita kiel la nuna "referendumo" en Orienta Ukrainio. Klare estas, ke se Rusio ne estus au mem organizintion au almenau subtenantaj la aferon, tiu referendumo ne okazus.

Siatempe neniu agnoskis la referendumon de Serboj en Krajina, tamen ghi ekzistis tiom longe (4 jarojn) ghis Kroatio tiom fortighis ke per la propra armeo ghi povis perforte rekapti tiun regionon. Tio okazis sed tiam devis elloghighi granda plimulto de chiuj serboj el tiu regiono.

Kaj denove la afero okazis pro interkonsento inter Serbio kaj Kroatio (sekreta). Tio signifas, ke la stato en Ukrainio restos longe tia, ghis pro iuj kaŭzoj Putin akceptos ke Ukrainia ŝtato forpelu la ribelintajn rusojn de tiu teritorio. Zlatko

====

2014-05-13 Al informas pri per-ŝtata torturo - tutmonda kruelajho

En la jaro 1984 estis deklarita la Konvencio Kontraŭ Torturado, kaj 155 ŝtatoj ratifis ghin. Tamen nun Al raportis pri torturo en 79 de tiuj 155 landoj. Inter tiuj kie torutrado estas sistema metodo trovighas - kaj prezentita per ekzemploj: Meksiko, Nigerio, Maroko kun la okupita lando Okcidenta Saharo, Filipinoj kaj Uzbekio. Polico uzas ghin kiel facila metodo trovi kulpulojn; ŝtatoj por ekskludi (ech neniigi) disidentojn.

Al postulas ke la kunlaboro inter Eŭropo kaj Usono rilate torturon flanke de la usona CIA estu analizata. Jen la ligo al la raporto en pluraj lingvoj (ar, en, es, fr):

<http://www.amnesty.org/en/news/amnesty-international-global-crisis-torture-exposed-new-worldwide-campaign-2014-05-13>

---

2014-05-12 En la regionoj Donezk kaj Lugansk okazis ne-valoraj referendumoj - simile Krimeo. OSKE kaj EU ne akceptas la rezulton, ĉar la proceduro ne obeis jur-ŝtatajn regulojn - por nomi nur la plej evidentajn falsajn aplikojn:

Mankis neutrala observado, neniu kontrolis ĉu voĉdonado estis unika - oni raportis pri plurfoja voĉdonado, la kestoj estis travideblaj kaj la balot-folioj ne estis en koverto.

Ni esperas ke OSKE sukcesos inviti chiujn rilatajn grupojn al la Ronda Tablo, por reiri al justa konduto, kaj retrovi pacon inter la homgrupoj.

(lau radio-raportoj el la regiono kaj lau taz, 2014-05-13, p.4)

*Komento: AVE/mw:*

EU devus oferti rapidan alighon al Moldavio kaj Ukrainio, kaj zorgi pri jurshtateco - lau-pashe rezultoj de koruptaj alproprigoj devos esti re-prenataj, inkluzive da deponajhoj en eksterlandoj. Finfine ni havu pacan konkurencon/kunekzistadon inter la du sistemoj: EU kaj Eurazia Unio

---

2014-05-04 NATO - dependas de Usono, malpli de ktp.

Bedaurinde la realo estas multe pli malbona. NATO konsistas el 90% da armiloj kaj komandantaro de USONO. Aliaj estas nur "dekorajho". NATO servas al la kontrolo super la mondo far USONO. EU estas pli malpli en NATO kaj pro tio devas obei la internacian politikon de Usono. Ne havante la propran armeon, EU estas nur kolonio de Usono. Chiuj membroj de NATO havas fremdajn trupojn sur sia teritorio, NATO havas preskau 10.000 armeajn centrojn en la mondo. Kiu iam ajn audis pri sendependeco de ŝtato sur kies teritorio ekzistas fremdaj trupoj? La Ukrainan politikon decidus Usono kaj EU simple sekvos.

(komento de Zlatko al la raporto/komento pri la ideo de AVE/mw: NATO kiel estonta arma brako de UN)

===

#### 2014-05-04 **Ukrainio inter EU & Usono kaj Rusa Eurazia Unio**

Hierau mortis pli ol 40 homoj en Odessa pro incendio iamaniere kauzita el la manifestacioj kontraŭ Ukrainio. Post piedpilk-ludo okazis manifestacio favore al al integro de Ukrainio. Tiuj manifestaciantoj estis ataktitaj de pro-rusia grupo. El tio estighis batalo - kaj la incendio. Almenaŭ post 8 (9) tagoj la okupantoj en Slavjansk re-liberigis la militarajn observistojn, kiuj agis sub la reguloj de OSKE.

En la aktuala ĵurnalo "Wostok" - iama "Sovjetunion heute" - estas intervjuo kun la ukraina ambasadoro en Germanio, Pavlo Klimkin, kiu diris laŭsence:  
„Unue la homoj manifestaciis favore al la integriĝo en Europon, nur poste (pro la reagoj de la registaro) sekvis la postuloj kontraŭ korupcio kaj por jur-shtateco.

Ukrainio ne povas resti plene sendependa. Tute nature ghi havos diversajn kontaktojn kun Rusio. Sed ghi povas au komunumi kun la Eurazia Komunumo (de Putin) au kun la EU-a Komunumo. Granda plimulto en Ukrainio preferas EU-on, sole en Krimeo estis 41% kiuj preferis aliron al Rusio (rezulto el publika demando - kiam?).

La provizora registaro de Ukrainio subskribis la politikan parton de la Asociiga Traktato kun EU; la ekonomia parto estas malpli facila, unue pro la granda diferenco al EU, due pro la ekonomia interplektigho kun Rusio.

Rusio tiras influante al sia direkto, EU (& USA) al la sia. Chiu kun siaj rimedoj.

Rusio ne malpli sekrete agadas (invadante per soldatoj en Krimeon ktp. sen blazonoj ...) ol Usono.

La jur-shtateca bazo de EU kun (preskau plena) divido de la povoj garantias pli fortan agadon kontraŭ korupcio ol la Rusa centrismo.

La jur-shtateca bazo de EU ankaŭ pli defendas la Homajn Rajtojn (plejparte) kompare kun la rusia tradicio de carismo & stalinismo, kie la unuopa homo ne valoris.

---

#### 2014-05 **Penseroj\* pri la rolo de NATO kaj UN:**

Preferinde estas EU-armeo sub demokrata politika kontrolo, por defendi la limojn. Kaj NATO ighu la atlantika armea brako de la UN Sekurec-Konsilio - sen Veto-rajtoj.

Chu Verduloj povas akcepti armeojn ?

Post Sarajevo (por resti sur nia kontinento) mi komprenis ke pura pacifismo ne sufichas.

Tamen - ni ja spertis la usonan fi-propagandon (Irako ...) - ke oni ne kredis la povulojn (tion jam skribis la malnova biblio). Plej gravas la tendenco ekkoni konfliktojn frue kaj trakti la problemojn, ekz-e je Ronda Tablo kun chiuj agantoj kune kun neutrala mediatoro.

En Sirio oni - ne nur la Assad-partianoj - mortigis cent-milojn. Assad, malpermesante protestojn, kaj malakceptante reformojn, komencis la pafadon & bombadon kaj terorigas tiun parton de sia popolo kiu ne estas sur sia flanko.

Rapida internacia interveno povintus krei Rondan Tablon por diskuti la diversajn interesojn kaj eltrovi komunan solvon (eble tro idealisma pensado). Sed chi-kaze Rusio defendas sian geostrategian intereson (ekz-e havi havenon en la Mediteraneo) - kaj uzadis sian Veto-rajton por bari chiajn UN-postulojn kontraŭ Assad.

\*) persona opinio de Manfred Westermayer, plejparte kohera kun la Verdula Programo

===

#### 2014-03-17 **Rusio eble gajnis Krimeon - antaŭvideble - sed perdas plie reputacion.**

La provizora registaro en Kievo faris grandan eraron, kiam ili nuligis la leghon de 2012 pri oficiala uzado de la rusa lingvo (au tatara) en regionoj kie vivas pli ol 10%.

Nun oni propagandas tie, kie ankaŭ vivas pli da rusdevenaj homoj (linio inter Krimeo - oriente de la Dnjepro - Hharkov).

Rusio hejtigas konfliktojn, por havi la argumenton enmarŝi kaj liberigi la sam-lingvanojn - same kiel sur Krimeo.

Rusa armeo amasighis laŭlonge de la ukraina limo, kaj kashe (sen blazonoj) eniris la krimean teritorion.

Sabate estis du manifestacioj en Moskvo: unu por la registara politiko, la alia por libereco kaj lasi la fingrojn de Ukrainio, inkluzivante Krimeon.

Ankaŭ kelkaj rusdevenaj homoj sur la Krimeo - mi audis studentinon - preferus resti che



Ukrainio, ĉar tie estas pli da publika libereco.

Multaj preferas Rusion pro la ekonomia stabileco.

Aliflanke mi legis longan leteron de homoj en rusa urbo Tver al la Prezidento: "Tre estimata Vladimir Putin ..... bonvolu engaghighi, ke la richaj rusaj regionoj sendos humanitaran helpon al ni, same kiel vi faris por la Krimeo...."

(taz, 2014-03-11, p.14 laŭ Novaja Gazeta, 2014-03-10)

Laŭ radio-informoj de ĵurnalistoj (okcidentaj) sur Krimeo, en Kievo kaj Moskvo, la Referendumo pri Krimeo estis farso:

- plejparte bojkotis la voĉdonadon ukrainaj kaj krimeo-tataraj personoj - pro tio 80%a partopreno estas malvershajna;
- estis nur du alternativoj: autonomio aŭ aligo al Rusio;
- la demandilo ne entenis la alternativon "resti parto de Ukrainio";
- oni rajtigis voĉdoni la rusajn soldatojn/milit-turistojn surbaze de ilia rusa pasporto;
- la ujoj por enmeti la voĉdonilojn estis travideblaj, oni metis nefalditan formularon en la ujon, tiel la voĉdonado estis malsekreta;
- ne partoprenis sendependaj internaciaj kontrolistoj por la tuta voĉdonada proceduro. Kelkfoje necesas jardekoj por ripari falsajn decidojn.

---

2014-03-08 **Aktuale pli Ukrainio** - komento de mw/AVE:

Feliĉe ankaŭ en Rusio ekzistas homoj kaj institucioj, kiuj povas pensi mem, ekz-e TV Doshd: [www.tvrain.ru](http://www.tvrain.ru) kaj Jabloko. Mi regule auskultas raportistinojn de nia ŝtata radiostacio [dradio.de](http://dradio.de), kiuj en ambau landoj parolas kun kaj auskultas al diversaj homoj.

Ni komprenas, ke ekzistas emo, en Rusio kaj inter homoj kiuj sentas sin rusoj, restitucii la situacion dum sovetiaj tempoj, kiam Krimeo apartenis al RSSR. Tamen la metodo kiun la prezidento Putin aplikas estas kontraŭ la internacia leĝaro, kaj same lia rifuzo kunlabori kun OSKE estas malagraba. Ĝi similas (kiel diris s-ino Clinton) tiun de Hitler kiam li anektis/prenis la Sudeto-regionon en Ĉeĥoslovakio, kie vivis multaj germanoj; li uzis la samajn/similajn pretekstojn. Kaj la aliaj ŝtatoj ne volis fari militon pro tio - same kiel nuntempe. Ĉiukaze la reputacio de Putin en okcidento malaltighas pli kaj pli; kaj la Rublo falas.

Mi esperas ke Eŭropo subtenos Ukrainion finance por retrovi stabilecon. Necesos grandaj penoj ankaŭ por atingi energian sendependecon/suverenecon, kion ankaŭ ni en Germanio ankoraŭ ne havas. Efike uzi la ter-gason kaj kurenton bezonas:

- krom la sinteno (malhalti energio-vorajn aparatojn, lumon, lavi sin per malvarma akvo, varmigi (en la domo) la korpon pere de vestaĵoj por redukti la bezonatan energion)
- monon, ekz-e por intershanghi lumbulbojn (kun ardanta drato) kontraŭ LED-oj, aĉeti pli efikajn fornojn, varmo-izoli la domojn, uzi PV, sun-varmon kaj venton.

La granda lando Ukrainio povus produkti bio-gason el grenoj kaj aliaj plantoj, eĉ el karbo, sed pro tio oni bezonas monon. Vento-energio oni jam aplikas parte.

Jen du aktualaj intervjuoj en la germana lingvo:

Ralf Fuecks, HBS = Heinrich Boell Stiftung, ligita al la germana Verda Partio:

[http://www.deutschlandradiokultur.de/krim-konflikt-hoffnung-auf-wirksame-sanktionen.1008.de.html?dram:article\\_id=279519](http://www.deutschlandradiokultur.de/krim-konflikt-hoffnung-auf-wirksame-sanktionen.1008.de.html?dram:article_id=279519)

Galina Michailowa, Jabloko = rusa demokratia partio, unu el la malmultaj sendependaj grupoj en Rusio: [http://www.deutschlandfunk.de/russland-und-die-krim-putin-ist-unberechenbar-geworden.694.de.html?dram:article\\_id=279524](http://www.deutschlandfunk.de/russland-und-die-krim-putin-ist-unberechenbar-geworden.694.de.html?dram:article_id=279524)

2014-02-23 la **korupta prezidenta demokratio finighis** - espereble venos vere parlamenta demokratio - kiu bazighas sur la jur-ŝtateco kun libera ĵurnalismo kaj kritiko.

JK Rinalo por EEU skribis:

Yanukovich dimisiita de la Ukraina Parlamento. En Kharkiv, ĉe la rusa limo, al loka televido li ridinde denunciis ŝtatrenverson komparante la nunan situacion en Ukrainio al tiu de Germanio en 1930, kiam naziistoj de Adolf Hitler atingis la povon.

Liberigita Tymoshenko. En vespera parolado en placo Sendependo ŝi deklaris: falis la diktaturo La Ukraina Parlamento decidis novajn elektojn la 25an de majo, samtempe kun al eŭropaj elektoj! (laŭ diversaj informoj, ankaŭ de ARD.de)

====

2014-02-20 **Ukrainio - chu eblas bona solvo ?**

Vi certe legis/audis pri la 26 mortintoj (inter ili ch. 7 policistoj) kaj ch. mil vunditaj pro la brutala agado de la shtata milico en Kievo, hodiau denove precizaj pafistoj mortpafis 21 el la manifestaciintoj kiuj staris sur la barikadoj.

Malgrau intertraktita interrompo. Aliflanke ankau la manifestaciintoj ne agas senperforte. Krome t.n. „Petushki“ (laudire eksaj krimuloj ?) tiranigas kuracistojn kaj homrajtajn CSO-ojn. Tiel ne eblas gajni kontrau forta sistemo.

AVE plene subtenas la manifestaciintojn, kiuj pledas por vera demokratio kun sendependaj povo-organoj kaj jhurnalismo, kritikas la klanan koruptecon chirkau Janukovich; aparte volas rehavi la malnovan konstitucion, kaj la leghon por redukti la povon de la prezidento (el la tempo de Jushchenko).

**Marie-Luise Beck**, germana parlamentano de la **Verduloj** diris ke estas paradokse, ke la **infanoj (ktp) de la prezidento eksportas siajn monegojn (multaj milionoj) en la okcidenton**, sed samtempe li rifuzas (premite de Moskvo) la kunlaboron kun la EU.

Ili scias, ke tie la mono estas sekura.

Ne necesas apartaj sankcioj: **sufichas apliki la leghojn kontrau mono-lavado**; se la eksterlandaj investandoj devas klarigi detali - kaj kontroleble - de kie ili gajnis la richecon. Necesas sen-partia mediatoro - ekz-e OSKE (Organizo por Sekureco kaj Kunlaboro en Europo); **komuna agado de Rusio kaj EUropo povus pacigi la situacion**, lau Knut Fleckenstein (SPD) de la Europa Parlamento.

(lau diversaj informoj)

*Komento AVE/mw:* Ukrainio povus esti ponto inter okcidenta Europo (EU) kaj Rusio. Ghi devus havi bonajn rilatojn al ambau regionoj. EU same kiel Rusio povas subteni Ukrainion, sed ili ne rajtas kateni la landon al sia bloko. Se la regantoj de Ukrainio lernus, ke malpli da povo en la propra mano kaj redukto de korupteco povus fortigi la tutan landon.

===

2013-11-14 **Amazigh protestas por sia lingvo** - baras gas-dukton.

Tiu indighena popolo de la montaro en Algerio kaj Libio havas propran lingvon, kiu estas malpermesita. Pro tio ili baris la gas-dukton, kiu liveras ter-gason al Europo.

(lau Mirco Keilberth, taz, 2013-11-14, p. 11)

---

2014-02 **Kritika jhurnalismo estas la bazo de demokratio - malshatata de moshtuloj**

Ne nur en Rusio au P.R.Chinio oni malliberigas jhurnalistojn au advokatojn kiuj kritikas la agadon de la regantoj (sur diversaj niveloj). Ankau la prezidanto de Turkio ne emas esti kritikata. Ofte temas pri korupcio, au misuzo de la povo. Se la majoritato au sola partio ne emas mem-purige kritiki; sendependaj jhurnalistoj kaj fajfistoj provas fari tion, sed ofte ili riskas multon:

la vivon, la sanon, la liberecon, la ekonomian ekziston (necesus citi multajn landojn).

Ech el Austrio venas chi-rilataj plendoj, kaj la Verduloj postulas korekti la mis-farojn:

<http://de.wikipedia.org/wiki/SOS-ORF>

Kompreneble, kritiko devas bazi sur veraj okazajhoj.

Demokratio bezonas, krom la tri povoj, sendependan kritikon.

Legu pli detale en la libro de UNESKO „Kio estas Demokratio“ eldonita de UEA (2000).

---

2014-02-02 **Ne nur mediodetruaj, sed ankau homrajto-detruaj Olimpikoj en Sochi**

CSO-Aktivistoj (CSO, Civil-Sociaj Organizajhoj = NRO) estis punataj kaj estas minacataj de shtataj organoj, ekz-e J. Witschko kiu por la Ekologia Monitora Gardo informis pri medio-minacado estis punita al 3-jaroj da malliberejo.

La rusa Centro pri Ekologiaj Ennovigoj kalkulis la „ekolgian pied-premon“ de la OL en Sochi: pli ol 5 milionoj tunoj da CO2, pli ol duono por la konstruajhoj, la resto por la transporto kaj vivo de la sportistoj kaj aliaj vizitantoj; ghis nun nur ch. 10% de tio estus kompensataj - sed tamen oni fanfaronas pri „Verdaj Ludoj“ - certe simila rilato ankau validus por aliaj OL.

(en la rusa, kaj angla) <http://www.ngo-cei.ru/>

(en la rusa) <http://ewnc.org/>

(kompleta informo en la germana)

<http://www.sonnenseite.com/Aktuelle+News,Russland+unterdrueckt+den+Umweltschutz,6,a27688.html>